

I

Antaŭsignoj

Estis je la mateno de bela, varma, esperoplena printempa tago. Kara, kara sunradio vizitis min tra la fenestro kaj diris „Dio salutas vin!“ Venis la ‚Koretinjo‘ supren el sia teretaĝo, kaj portis al mi la unuajn matenajn poŝtaĵojn, kiuj ĵus estis transdonitaj de la leteristo. Ŝi sidiĝis vidalvide al mi, kiel ĉiutage plurajn fojojn, kaj malfermis la leterojn, pro laŭte legi la inhavon al mi. Sed jam antaŭ ŝi povis komenci, mi aŭdas nun soni la demando: „Kiu estas la ‚Koretinjo‘? Tiel ja fakte neniu nomiĝas. Tiu certe estas karesnomo.“

Jes, fakte estas karesnomo. Ĝi devenas de la unua volumo de miaj ‚Rakontaĵoj el la Erzgebirge:aj Vilaĝoj‘. En tiuj estas priskribataj ‚tipa monteto‘, ‚tipa vilaĝeto‘, ‚tipa ĝardeneto‘ kaj ‚tipa dometo‘, en kiu loĝis la ‚Koretinjo‘ kun sia patrino. Tiu ‚Koretinjo‘ estis, kvankam ne la korpa, sed plie la anima rebrilo de mia edzino, kaj dum mi ĉiam pli estis aminta la portreton, pri kiu mi laboradis, tiel ke mi nomis ĝin ‚Koretinjo‘, tiel ja memkompreneblas tute facile, ke tiu nomo transiĝis iom post iom al la originalo. Sed ne en ĉiuj kazoj! Fakte, kiam sinistraj nuboj estas je la ĉielo, pri kiuj mi sed kulpas mem, mi diras ‚Klara‘. Kiam tiuj nuboj estas malaperantaj, mi diras ‚Klaranjo‘. Kaj kiam ili forestas, mi diras ‚Koretinjo‘. Sed mia edzino nomiĝas sin mem al mi neniam aliel sed ‚Koretinjo‘, ĉar ŝi ja neniam kaŭzas nubojn.

Dum la supra etaĝo enhavas la miajn ĉambrojn, apartenas al ŝi la tuta teretaĝo de la domo. Tie ŝi regas kiel nelacigebla, diligenta mastruma anĝelo, akceptas la ĉiam pli multenombriĝantajn vizitojn de miaj legantoj, kaj respondas al ĉiuj leteroj, kio estus neeble al mi propramane. Sed ili ĉiuj estas laŭtlegataj al mi, dum kio ŝi kutimiĝis agi tiel, ke la aparte gravaj estas intertempe metataj flanken, pro esti fortentataj por la fino de la legado.

Tiel ĝi estis ankaŭ hodiaŭ. Kiam ĉio alia estis finigita, restis du aĵoj, kiuj jam per la unua vido ŝajnis al ni esti specialaĵoj, kaj tial estis apartigitaj, fakte letero el Ameriko kaj antropologia fakgazeto el Aŭstrujo. En la lasta, la titolo de pli longa artikolo estis

akcentita per blua streko. Ĝi estis: „La estingiĝo de la indiana raso en Ameriko kaj ilia perforta forpremo per la kaŭkazianoj kaj ĥinoj.“ Mi petis al la Koretinjo tuj laŭtlegi la artikolon, ĉar hazarde mi havis tempon pro tio. La aŭtoro estis bonkonata, eminenta universitata profesoro. Li skribis per ega korvarmumo, kaj ĉio, kion li diris pri la ‚ruĝuloj‘, ne nur estis bonvole, sed ankaŭ juste. Mi ŝate estus preminta lian manon pro tio. Sed li faris eraron, kiu estas same ĝenerale kiel nekomprenoble. Fakte li erare interŝanĝis la indianojn de la Unuiĝintaj Ŝtatoj kun la tuta raso, kiu estis disvastiĝinta sur Nord- kaj Sudameriko. Krome li interŝanĝis la animan dormon de la raso kun ĝia korpa morto. Kaj li ŝajnis serĉi la ĉefan taskon de la homa genro en la evoluado de popolecaj propraĵoj kaj individuecoj, sed ne en la ĉiam pli disvastiĝanta ekkono, ke ĉiuj triboj, popoloj, nacioj kaj rasoj iom post iom aliancu kaj unuiĝu, pro la formigo de tiu unu sola, granda, kaj alte super ĉiaj bestaĉaĵoj staranta noblahomaro. Nur tiam, kiam la homaro de interne, do per si mem, naskis sin mem je tiu harmonia, de Dio volita personeco, la kreado de la vera ‚homo‘ estos finigota, la paradizo denove malfermiĝos al ni, la ĝis tiam mortemuloj.

La letero el Ameriko estis tute verŝajne eksendita en la ‚Fora Okzidento‘, sed kie ekzakte, tio ne estis rekoneble per la malfermita koverto, ĉar ambaŭ flankoj surhavis tiom da stampoj kaj manskribitaj loknomoj, ke ĉio estis nelegeble. Nur la adreso estis teninta sian dekomencan klarvideblecon, certe per ĝia vere indiana koncizeco. Ĝi konsistis nur el tri vortoj, kaj estis:

*M a y .
Radebeul. Germany.*

Ni malfermis la koverton kaj eltiris paperfolion, kiu estis videble tranĉita per granda tranĉilo, verŝajne *bowieknife*, kaj poste kunfaldita. Ĝi surhavis la jenajn liniojn en la angla lingvo, kiujn mi memkomprenble esperantigas; ili estis skribitaj per mallerta, sen-sperta mano per kraĵono:

*„Al Old Shatterband.
Ĉu vi venos al la Mount Winnetou? Mi venos tute certe. Eble eĉ Avat-vila, la centjarulo.
Ĉu vi vidas, ke mi povas skribi? Kaj ke mi skribas en la lingvo de la palvizaĝoj, ĉu?
Vagare-tej,
ĉefo de la Ŝoŝonoj.“*

Kiam ni estis legintaj tion, mi surprizigite vidis al la Koretinjo, kaj ŝi same al mi. Ni ja ne miris, ke ni ricevis leteron el la fora okzidento, eĉ de indiano. Tio okazas tre ofte. Sed ke tiu letero venis de la ĉefo de la Serpento-indianoj, kiu neniam antaŭe estis skribinta al mi, tio miregiĝis min. Lia nomo Vagare-tej signifas tiom kiel ‚Flava Cervo‘. Mi petas legi pri li en mia libro ‚Kristnasko‘. Tiutempe, do nun antaŭ pli ol tridek jaroj, li ankoraŭ estis juna kaj sufiĉe sensperta, sed bona, honesta homo, kaj estis estinta lojala, prifidinda amiko al mi kaj mia Winnetou. Lia patro Avat-vila aĝis pli ol sesdek jarojn,

estis dignulo tute kaj plene, kaj efikigis sian egan influon, kiun li posedis, ĉiam nur pro nia bono. Pro tiu lia multajara aĝo, kaj ĉar mi neniam poste iam aŭdis pri li, mi estis pensinta, ke li estus ekmortinta. Sed nun mi ekkonis per la letero, ke li ankoraŭ vivis, kaj estis en bona korpa kaj mensa stato. Ĉar se tio ne estus estinta la kazo, la skribinto neeble estus povinta sciigi, ke la plej alta militestro de la ŝoŝonoj eble ankaŭ venus al la Mount Winnetou.

Fakte mi havis eĉ ne la plej etan ideon, kie tiu monto troviĝis. Mi nur sciis, ke la apaĉoj estis volontaj interkonsentiĝi kun la amikaj kaj aliaj triboj, nomi ajn ian monton, kiu taŭgis laŭ ĝia situo, ĝiaj ecoj kaj ĝia eminenteco pro la honorigo de ilia plej amita ĉefo. Pri tio, ke tio estis okazinta, mi ne estis aŭdinta ion, kaj jam tial mi estis des malpli sciigita, kiu monto estis elektita. Sed tiom mi povis antaŭpensi, ke ne estis iu, kiu situis ekster la regiono, en kiuj la apaĉoj migras. Kaj ĉar la serpento-indianoj havas iliajn restejojn kaj paŝtejojn multajn tagrajdadojn norde de tie, certe devis estis elstaranta kazo, ke viro, kiu aĝis cent jarojn, sentis sin kapable fari tian vojaĝon, ne per mizero, sed pelite de sia junrestinta koro.

Kaj kial li venu kun sia filo tiel fore suden? Tion mi ne sciis. Mi eĉ ne trovis, malgraŭ plej akra pripensado, neriproĉeblan respondon al tiu demando. Mi ne povis fari ion, nur atendi, ĉu eble venus pli da tiaj sendaĵoj de aliaj partioj. Respondi al tiu letero ne eblis, ĉar mi ne konis la nunan troviĝolokon de la du ĉefoj. Sed ĉiukaze ne estis malgrava kaŭzo, kiu igis ilin viziti la regionon de la apaĉoj, kiu estis tiel for de ili. Mi supozis, ke tiu kaŭzo ne bazis en intimaj, pure personecaj rilataĵoj, sed ke ĝi estis pli ĝenerale grava, kaj ĉar mia adreso estas konata tie transe, kaj ĉar mi korespondas kun multaj tie loĝantaj personoj, pri kiuj mi rakontis, kaj plu rakontos en miaj libroj, mi ja rajtis esperi baldaŭ ekscii pli.

Kaj kiel mi pensis, tiel okaziĝis! Apenaŭ du semajnojn poste venis dua letero, sed de partio, de kiu mi ege plej malmulte estus ekspektinta vivsignon aŭ eĉ skribaĵon. La kuverto surhavis ekzakte la saman adreson, kaj la en la angla skribita enhavo estis, esperantigata, la jena:

„Venu al la Mount Winnetou pro la granda, lasta batalo! Kaj finfine donu al mi vian skalpon, kiun vi ŝuldas al mi dum jam du homaĝojn! Ĉi tion lasis skribi al vi

*To-kaj-tŝun,
la ĉefo de la Rakuro-Komanĉoj.“*

Kaj nur unu semajnon pli poste mi ricevis, ankaŭ per la sama adreso, la jenan skribaĵon:

„Se vi havas kuraĝon, transvenu al la Mount Winnetou! Mia sola kuglo, kiun mi ankoraŭ havas, sopiras al vi!

*Tangua,
la plej maljuna ĉefo de la Kajovajoj.
Skribite de Pida, lia filo, la nuna ĉefo de la kajovajoj, kies animo salutas la vian.“*

Tiuj du leteroj estis altgrade multinformaj, fakte ne nur psikologie. Preskaŭ ŝajnis, kvazaŭ ili estis diktitaj de To-kaj-tŝun kaj Tangua je la sama loko kaj per la sama influo. Ambaŭ malamamis min, ankoraŭ same nepacigeble kiel ekde ĉiam. Tute strange estis, ke la filo de Tangua salutis min malgraŭ tiu malamo, sed ne malfacilis al mi kompreni tiun dankemon. Sed pli grave, multe pli grave ol ĉi ĉio estis, ke la malamikoj de la apaĉoj ankaŭ volis iri supren al la Mount Winnetou. Estis parolita pri ‚lasta granda batalo‘. Tio sonis elstare danĝere. Mi komencis afliktiĝi serioze. Aŭ ĉu tie transe estis iu, eble malnova, ekstempa kontraŭulo, kiu nun, en miaj altaĝaj tagoj, volis fari la ŝercon mistifiki min, kaj farigi min naivan vojaĝon al Ameriko? Sed post duono de monato mi ricevis ĉi jenan leteron, kiu estis eksendita en Oklahoma, kaj estis dokumento al mi, al kiu mi povis kredi plene:

„Mia kara, blanka frato!

La granda, bona Manitou en mia koro devigas min diri al vi, ke alianco de la maljunaj ĉefoj kaj alianco de la junaj ĉefoj estis vokataj al la Mount Winnetou pro juĝadi pri la palvizitaĝoj kaj decidi pri la estonto de la ruĝaj viroj. Vi venos, kaj mi venos. Mia animo ĝojas esti vidonta vian. Mi nombras la tagojn, borojn kaj minutojn, ĝis mi revidos vin!

Via ruĝa frato

Mato-ŝako

Ĉefo de la Ozagoj“

Ankaŭ tiu letero estis skribita en la angla, fakte de lia filo, kies manskribon mi konis, ĉar mi korespondis kun li. Krome Mato-ŝako estis almetinta sian ledan totemon, kion li ĉiam faris, kiam estis grava afero. Mi do povis rezigni pri mia supozo de mistifikado. La afero estis realo, estis seriozo. La penso transiri komencis vigle okupi min. Sed certe necesis, pro fine decidi pri tiu penso, antaŭe ekscii detalojn kaj certigojn. Kaj tio ne daŭris longe plu. Mi ricevis grandfolian, oficiale kunfalditan leteron, kiu certe laŭ intenco devis esti invito, sed jam per ĝia esprimmaniero devis esti nomata ‚sciiga raporto‘. Mi redonas ĝin en esperanta traduko:

„Tre estimata sinjoro!

Dum la lastjaraj kunsidoj de la ĉefoj estis unuanime decidita, nomumi la pro tio plej taŭgan monton de la roka montaro estonte per la nomo Winnetou, laŭ la plej fama ĉefo de ĉiuj nacioj. Pro tio estis elektita la plej versajne ankaŭ de Vi almenaŭ geografie konata kulminacio, sur kiun retiriĝis la mistera medicinisto Tatela-sata (Thousand Years). Je la bazo, respektive sur la plataĵoj de tiu monto estu farataj ĉirkaŭ la mezo de la ĉijara septembro la jenajn kunvenojn:

- 1. La campmeeting de la maljunaj ĉefoj.*
- 2. La campmeeting de la junaj ĉefoj.*
- 3. La campmeeting de la ĉefedzinoj.*
- 4. La campmeeting de ĉiuj krome famaj ruĝaj viroj kaj ruĝaj virinoj.*
- 5. La fina meeting sub la prezido de la ĉi subskrinta komisio.*

Estas lasata al Via propra plaĉo, pro tio aperi tie persone kaj anonciĝi al la prezidanto aŭ al ties anstataŭanto, dum kio estos sciigata al Vi la temo de ĉi ĉiuj interkonsiladoj. Samtempe Vi estas atentigata, ke tiuj meeting-oj, same kiel ĉiuj pretigadoj pro ili, estu sekrete fortendaj de la anoj de aliaj rasoj. Ĉi kune ni devigas Vin al plej rigida diskrecio kaj sentas nin rajtigataj supozi, ke ni jam ricevis Vian honorpromesan aserton pri silentado. Nombrokuponoj por la dum niaj kunvenoj okupendaj sidlokoj Vi haviĝu persone de la subskribinta protokolisto. Ĉiuj paroladoj pri la interkonsilada temo estos farendaj, pro pli bona kompreno, en la angla lingvo.

Altestime

La Komisio.

Simon Bell (Tŝo-lo-let),

profesoro de filozofio, kiel prezidanto.

Edward Summer (Ti-iskama),

profesoro de klasika filologio, kiel anstataŭanto de la prezidanto.

William Evening (Pe-vida),

agento, kiel protokolisto.

Antonius Paper (Oki-tŝin-tŝa),

bankisto, kiel kasisto.

Old Surehand,

sociano, kiel direktoro.“

Tute malsupre je la rando de tiu skribaĵo estis de Old Surehand mem skribita privata komento:

„Mi esperas, ke vi venos ĉiukaze. Supozi, ke mia domo estas via, ankaŭ kiam ni ne estas hejme. Kiel direktoro mi nun bedaŭrinde estas ĉiam survoje. Nun estas por vi ege ĝojiga surprizo. Vi estos ravigata pri la povoj de niaj du knabuloj.

Via olda, lojala Old Surehand.“

Al tiu longa letero mi tuj alligas la sekvintan, pli mallongan, kiun mi ricevis.

„Mia frato!

Mi scias, ke vi estas invitita. Ja ne neglektu veni! Mi antaŭĝojas pri vi nepriskribeble.

La du boy-oj skribos al vi poste aparte.

Via Apanatŝka,

ĉefo de la Pohonimo-Komanĉoj.“

Tiuj ‚du boy-oj‘, aŭ, kiel Old Surehand esprimiĝis, ‚niaj du knabuloj‘ poste skribis tiujn liniojn al mi:

„Altestimata sinjoro!

Kiam Vi iam kondukis nin tiel severe de nia malĝusta, vulgara vojo de la arto transen

al la pli alta, jes, plej alta vojo, ni promesis al Vi, ke ni poste nur tiam enpublikiĝos, kiam ni kapablas pruvi per veraj kaj nekontraŭeblaj mastraj verkoj, ke la ruĝa raso estas neniamaniere malpli talentita ol ajn iu alia el la rasoj, ankaŭ rilate al la arto. Ni heredis nian talenton de nia avino, kiu, kiel Vi scias, estis plenindianino. Ni pretas nun fari la de Vi postulitan pruvon. Vi promesis al ni veni tien ĉi al ni, malgraŭ la longa distanco, pro ekzameni niajn verkojn. Ni opinias, ke ni ne devas timi tian ekzamenon, kaj atendos Vin ĉirkaŭ la mezo de septembro ĉe la Mount Winnetou pro bonvenigi Vin. Ni eksciis, ke Vi estis invitita partopreni en tiuj prisilentataj kaj ege gravaj interkonsiladoj, kaj havas la firman konvinkigon, ke Vi permesos al nenio lasi Vin forteni, kaj ke Vi aperos je la ĝusta tempo je la menciita loko. Per la plej alta estimo ni tute nin donemas al Vi,

*Young Surehand.
Young Apanatŝka.“*

Tiu sendaĵo vere estis io. Ĝi ĝojigis min, kvankam ĝi estis skribita de la du ,knabuloj‘ en tiu maniero nur per la intenco fari egan batumon per la kubuto sur miajn ripojn. Kiu legis mian vojaĝan rakontaĵon ,Old Surehand‘, povas facile pensi, kiuj estas tiuj du *boy*:oj. Kiu ne legis ĝin, tiun mi devas peti fari tion pro tute povi kompreni ĉi tiun volumon, kiu estas samtempe ankaŭ la kvara volumo de ,Old Surehand‘ kaj ,Satano kaj Iskarioto‘.

Kiel oni certe rememoras, evidentiĝis, ke Old Surehand kaj Apanatŝka estis fratoj, kiujn oni defarŭdis de ilia patrino, korpe, anime kaj mense ege talentita indianino. Pro eltrovi la cirkonstancojn de tiu rabo ŝi estis, kamuflita kiel virindiano kun la nomo Kolma-puŝi, traserĉinta multajn jarojn la urbojn de la oriento, la savanojn kaj praarb-arojn, sen atingi tiun celon, ĝis Winnetou kaj mi sukcesis ek trovi la de ŝi serĉitajn spur-ojn, kaj poste ankaŭ la du filojn, unu estiĝinte famega okcidentulo, la alia estiĝinte ne malpli fama komanĉa ĉefo, du elstare valoraj homoj, kies amikeco restis lojale al mi, malgraŭ ĉiaj ŝanĝiĝoj, tra kiuj kaj mia kaj ilia vivo devis pasi.

Ambaŭ poste edziĝis al bela, inteligenta fratinaro el la aparta tribo de Winnetou, la Meskalero-Apaĉoj, kaj al ĉiu el ili baldaŭ estis donacata la ĝojon posedi filon, al kiu ĉiuj talentoj de Kolma-puŝi estis traheredigitaj eĉ en pli alta grado. Ili havis la rimedojn lasi evoluigi tiujn talentojn. Young Surehand kaj Young Apanatŝka estis portataj al la oriento pro estiĝi artistoj, unu arĥitekto kaj skulptisto kaj la alia pentristo kaj skulptisto. La esperoj, kiujn oni havis pri ili, realiĝis. Poste ili iris kelkajn jarojn al Parizo, pro studadi tie la famajn atelierojn, poste al Italujo kaj fine eĉ al Egiptujo, kie ili mem taskiĝis konatiĝi al la leĝoj de la antikva gigantaĵa arto. Sur la vojo reen ili venis trans Germanujo, pro viziti min. Ili tree simpatiis al mi. Mi havis mian ĝojon pri ili, fakte ne sole nur tial, ĉar ili adoris mian nekompereblan Winnetou:n preskaŭ kiel duondion. Ankaŭ ilia arta volo kaj kapablo estis elstarante, kaj eĉ ŝajnis povi kreski plu. Sed bedaŭrinde ĝi estis en vere amerikeca maniero dekondukita al la vojaĉo de la *business*, kaj tiel okaziĝis, ke ili devis aŭdi de mi, anstataŭ laŭdon, tre seriozan averton, kiun ili, kiel mi ekkonis per ilia letero, ne povis pardoni nek forgesi ĝis hodiaŭ. Tio ŝajne ankaŭ estis la kaŭzo,

kial mi ne estis sciigita pri iliaj estontaj planoj kaj pri ilia nuna arta kreado, nek de iliaj patroj, nek de ili mem. Tutaparte oni sed kondukis silenteme al mi pri la kaŭzoj, kiuj igis la du junajn homojn studadi ĵus la kolosajn figurojn de la antikvaj egiptoj. Tio verŝajne devis resti sekreto. Sed nun mi komencis antaŭsenti, ke la „majstraj verkoj“, pro kiuj mi estis invitita ekzameni ilin, estis iel rilataj al tio.

Mi ne povas aserti tute kaj plene, ke la leteroj, kiuj atingis min en tiel rapida vico, kaŭzis ĝojon al mi. Kial oni ne diris rekte malkaŝe kaj sincere, pri kio ĉi ĉio fakte estis? Pro kio tiu sekretoplena *campmeeting*-ludado? Grandaj kaj fekundaj pensoj estas naskataj en sankta, neĝenata soleco, sed ne dum longaj paroladoj, kiuj ja povas esti nur kalkulitaj pro mallongaj sukcesoj! Kial tiu apartigo de la maljunaj ĉefoj de la junaj? Kial eĉ speciale tiuj ruĝaj virinoj? Kiuj estis la „krome famaj ruĝaj viroj kaj ruĝaj virinoj“? Ĉu la sinjoroj de tiu komisiono, kiu ŝajnis al mi tiel strange, eĉ pridubinde? Ili ja volis prezidi la finan *meeting*-on, do havi influon al ĉiuj decidoj de ĉiuj kunsidoj, do korekti ilin! La nomojn de la du profesoroj, du denaskaj indianoj, mi konis. Ili havis sonon bonan al mi. Sed la sono, en kiu ili skribis al mi, estis neniam aŭdacinta neniu Sam Hawkens, neniu Dick Hammerdull aŭ neniu Pitt Holbers. La protokolisto kaj la kasisto estis tute fremdaj al mi. Kaj Old Surehand kiel direktoro, ĉu? Kion devis signifi tio? Pro kio tie aparta „direktoro“? Ĉu eble pro pezigi lin per la morala kaj financa respondeco? Old Surehand estis okcidentulo de la plej unua rango; sed ĉu li ankaŭ havis la komercan *smartness*-on de amerika ruzulo, tion mi bedaŭrinde ne sciis. La afero ŝajnis al mi des pli pridubinde, ju pli longe kaj intense ĝi okupis min. Ankaŭ al mia edzino ĝi ne plaĉis. Nun, ke mi jam kunmenciis ŝin, estu ankaŭ dirata, ke ŝi ankaŭ ricevis skribaĵon, fakte la jenan:

„Mia kara, blanka fratino!

Nun miaj okuloj fine, fĥfine vidos vin; mia animo vidis vin jam delonge. La estro de via domo kaj viaj pensoj venos al la Mount Winnetou, pro interkonsiladi kun ni pri grandaj kaj belaj aĵoj. Mi scias, ke li ne faros tiun vojaĝon, sen ke vi akompanos lin. Mi petas vin diri al li, ke mi tenos la plej bonan el niaj tendoj prete por vi, kaj ke mi antaŭsentas vian venon kiel karan, varman brilon de la suno, kiu estis nekonita al mia vivo ĝis nun, kiam ĝi volas proksimiĝi al la adiaĥo. Do venu kaj alportu vian homamon, vian koran bonon kaj — vian kredon al la granda, justa Manitou, kiun mi ŝate volas senti tiel klare kiel vi, mia fratino, sentas ĝin.

Kolma-puŝi“

Mi menciis, ke la Koretinjo korespondis kun Kolma-puŝi, kaj ankoraŭ korespondas hodiaŭ, kaj ke tiu sendaĵo ne estis sen influo al nia decido. Se mi vere irus, nun kompreneblis per si mem, ke mi ne farus tiun vojaĝon sole. Alvenis ankaŭ pluaj leteroj. Inter ili mi elektas nur unu plu, ĉar ĝi ŝajnas al mi esti la plej grava el ĉiuj, kiujn mi ricevis pri tiu temo. Ĝi estis skribita de vere kaligrafie provadite nomenda mano, sur tre bonan paperon, volvita en la grandan totemon de tiu, kiu estis diktinta ĝin. La totemo konsistis el papermaldika antilopa ledto, kiu estis haviĝinta per traktado, kiun

konas nur la *indsman*:oj, la blankecon de la neĝo kaj la glatecon de porcelano. La enpikitaj signoj estis kolorigitaj ruĝe kaj blue per cinabro kaj alia, al mi nekonata farbo. La enhavo estis:

„Mia blanka, pli maljuna frato!

Mi demandis Dion pri vi. Mi volis scii, ĉu vi ankoraŭ estas inter tiuj, pri kiuj oni diras, ke ili vivas. La respondo venis per la sciigo, ke oni invitas vin partopreni en la septembraj interkonsiladoj tie ĉi sur miaj montoj, kies trankvileco kaj paco estu detruotaj por ĉiam. Estu petata, pro ĉiuj tiuj, kiujn vi iam amis tie ĉi, kaj eble ankoraŭ amas hodiaŭ, seki tiun alvokon. Hastu tien ĉi, ajn kie vi nun eble estas, kaj savu vian Winnetou:n! Oni volas miskompreni lin, kaj oni ankaŭ ne volas kompreni min. Vi nek vidis min, nek mi iam vidis vin. Kiel mi neniam aŭdis sonaĵon de via voĉo, tiel vi ankaŭ neniam aŭdis la sonon de mia. Sed hodiaŭ mia timo krias for trans la maro al vi, tiel laŭte, tiel laŭte, ke vi aŭdos ĝin, kaj vi nepre venu.

Neniu scias, ke mi vokas vin. Nur tiu, kiu skribas tion, devis ekscii tion. Li estas mia mano; li silentos. Iru, antaŭ ke vi aperas tie ĉi, al la Nugget-tsil. La meza de la kvin grandaj piceoj parolos al vi kaj diros al vi, kion mi ne povas konfidi al tiu ĉi papero. Ĝia voĉo estu al vi kiel tiu de Manitou, la granda, ĉiama kaj ĉionamantan spirito! Mi petas vin denove: Venu, ho venu kaj savu vian Winnetou:n! Oni volas sufoki kaj bati lin for de vi!

*Tatela-sata,
la Tenanto de la Granda Medicino*

Kion koncernas la en tiu ĉi letero menciita Nugget-tsil, oni komprenas per *nugget*:oj la pli aŭ malpli grandajn, purajn orajn buletojn, kiuj estas trovataj de la orserĉistoj aŭ unuope, aŭ kelkfoje sed en plenaj, abundaj nestoj. *Tsil* signifas en la apaĉa lingvo tiom kiel monto. *Nugget-tsil* do signifas ĉirkaŭe ‚Orbuleta Monto‘. Sur tiu monto konate la patro kaj la fratino de mia Winnetou estis murditaj de unu Santer. Pli poste, mallonge antaŭ la ekmorto de Winnetou, kiun li trovis en la interno de la Hancock-monto, li sciigis min, ke li estis enteriginta sian testamenton sur la Nugget-tsil, fakte je la piedoj de lia tie entombigita patro; mi tie estus vidonta multan oron, tre multan oron. Kiam mi poste rajdis al la Nugget-tsil pro haviĝi la testamenton, mi estis surprizigita de tiu Santer, kaj kaptata de aro de kajovajaj indianoj, ĉe kiu li troviĝis. Estro de tiu aro estis la tiutempe ankoraŭ juneca Pida, kiu nun, post pli ol tridek jaroj, lasis min saluti en la letero de sia patro, de la plej maljuna ĉefo Tangua, de lia ‚animo‘. Santer ŝtelis la testamenton, kaj forfuĝis kun ĝi, pro haviĝi la oron, kies trovejo estis priskribita en la lastvola dekreto de Winnetou. Mi alvenis je tiu loko, kiam li ĵus estis trovinta la trezoron. La kaŝejo estis sur alta roko sur la bordo de la soleca montlago, kiun oni kutime nomas la ‚Malhela Akvo‘. Kiam li vidis min, li pafis al mi. Kio okazis tiam, tio legeblas en la lasta parto de ‚Winnetou‘, volumo III.

Rilate al Tatela-sata, la ‚Tenanto de la Granda Medicino‘, mi konfesu, ke ĉiam estis estinta unu el miaj plej elkoraj deziroj unu fojon vidi kaj paroli kun tiu plej sekreto-

plena el ĉiuj ruĝaj viroj; sed neniam okaziĝis ŝanco, kiu povis plenumigi tiun vere elkoran avidon. Tatela-sata estas nomo, kiu devenas el la Taosa lingvo, kaj signifas laŭvorte tradukate ‚Mil Sunoj‘, sed per ĝia fakta uzo ‚Mil Jaroj‘. Ĝia posedanto do havis tiel nekutiman, jes, elstare altan aĝon, ke oni neeble povis difini ĝin. Same oni ne sciis, kie li estis naskita. Li apartenis al neniu certa tribo. Li estis estimata de ĉiuj ruĝaj popoloj kaj nacioj same alte. Kion cent kaj ree cent medicinistoj estis posedintaj dum la paso de la tempo je mensaj kapabloj kaj konoj, tion laŭdire posedis li, en la plej tuta sumo. Pro kompreni, kion tio signifas, oni sciis, ke estas debaze malĝuste, imagi indianan ‚mediciniston‘ esti kuracistaĉo, pluvofaristo aŭ trompumisto. La vorto medicina tute ne havas tiurilate nenion kune, kion ĝi havas ĉe ni. Al la indianoj ĝi estas fremda esprimaĵo, kies senco ŝanĝiĝis tiel ĉe ili, ke ni imagu per ĝi ĵus la malon, kiun ni estis imaginta antaŭe.

Kiam la ruĝuloj konatiĝis al la blankuloj, ili vidis, aŭdis kaj eksciis multajn aĵojn, kiuj faris egan impreson al ili. Sed pleje ili estis mirigitaj pri la efiko de niaj kuraciloj, niaj medicinoj. La certeco kaj resonanceco de tiu efiko estis nekompreneble al ili. Ili ekkonis la senfinan grandecon de la dia amo, kiu prezentiĝis per tiu donaco de la ĉielo al la homa genro. Ili aŭdis la vorton medicinon la unuan fojon, kaj ili ligis al ĝi la ideon de la miraklo, de la beno, de la dia amo, kaj de la al la homo nekomprenebla sekreta laboro per la plej sankta kaŝeco. Konkize la vorto ‚medicino‘ ĉe ili samiĝis al la vorto ‚mistero‘. Ili transprenis ĝin en ĉiujn iliajn lingvojn kaj dialektojn. Ĉio, kio rilatis al ilia religio, ilia kredo kaj ilia serĉado pro ĉiamaj aferoj, estis nomata ‚medicino‘. Same ankaŭ ĉiujn tiujn faktojn de eŭropa scienco kaj eŭropa civilizacio, kiujn ili ne povis kompreni, ĉar ili konis nek la komencojn nek la evoluiĝojn. Ili estis sufiĉe sinceraj kaj honestaj, pro malkaŝe konfesi, ke la avantaĝaĵoj de la palvizaĝoj estis pli multaj kaj pli bonaj ol tiuj de la ruĝaj viroj. Ili ĉiam provis fervore agi kiel la blankuloj. Ili transprenis de ili multan bonon, sed bedaŭrinde ankaŭ multan malbonon. Ili estis tiel infanecaj kaj tiel naivaj, ke ili supozis multajn aĵojn, kiuj inter la blankuloj estis sur la nivelo de la kutimaĵo, aŭ eĉ la vulgaraĵo, esti nekutime, alte, sankte, kaj transprenis ilin pro uzi ĝin por ĉiam, sen antaŭe ekzameni kaj sen demandi, kiujn konsekvencojn tio kaŭzus. Tiel ili ankaŭ adoptis la vorton ‚medicino‘, kaj nomis per tiu iliajn plejajn altumaĵojn kaj plejajn sanktaĵojn, sen sciĝi, ke ili ofendis kaj senhonorigis per tio ĵus tiujn altumaĵojn kaj sanktaĵojn. Ĉar je la tempo, kiam ili faris tion, la esprimo medicina ja ne havis la bonan, honorigan sonon kiel hodiaŭ. Ĝi posedis la fortan kunguston de magiaĉo, fikuracado kaj ventanimeco, kaj kiam la indianoj, per ilia naiveco nomis la iniciintojn de ilia fakte nur je la komenco estinta teologio kaj scienco ‚medicinistoj‘, ili ne antaŭsciis, ke ili estus neigonta la estintan famon de tiuj homoj por ĉiam.

Kiel alte tiuj rangis, antaŭ ili estis havintaj la ŝancon konatiĝi al la ‚civilizacio‘ de la blankuloj, tion ni ekkonas nun nur iom post iom, laŭgrade kiel ni lasas nian esploradon ĉiam kaj ĉiam pli malsupreniri en la estintecon de la amerika raso. Tiu estinteco prezentas al ni multajn punktojn, je kiuj la popoloj de Ameriko estis je la sama nivelo de tiu de la blankuloj. Ĉio, kio okaziĝis inter tiuj popoloj bone, elstare kaj noble, fontis el la ideoj kaj kapoj de tiuj viroj, kiuj estis nomataj de iliaj postuloj ‚medicinoj‘ kaj

„medicinistoj“. Per tiu vorto estis grupigitaj teologoj, politikistoj, strategiistoj, astronomiistoj, templokonstruistoj, pentristoj, skulptistoj, kipuo-deĉifristoj, profesoroj, kuracistoj, koncize, ĉiuj tiuj personoj kaj metioj, per kiuj okupiĝis la inteligentuloj kaj etikaj kapabluloj de tiuj tempoj. Inter tiuj poste nomitaj „medicinistoj“, eminentuloj, estis same famaj kaj famegaj nomoj kiel en la evoluiga historio de la aziaj kaj eŭropaj rasoj, kaj ili estas perditaj ne por ĉiam, nur intertempe, ĉar nia kono kaj kompreno ne jam estas tiel antaŭeniĝinta pro ĵeti lumon en tiun historian malhelon. Kiam hodiaŭ la medicinistoj de la estanteco ne plu estas la medicinistoj de la estinteco, la indiano ne mem kulpas pri ĉi ĉio. La mensa elito de la inkaoj, de la toltekoj kaj aztekoj, do la „medicinistoj“ de la peruanoj kaj meksikanoj, certe ne estis sur kultura nivelo sub tiu de la aventuristoj Cortés aŭ Pizarro, kaj kiam tiu tiutempa alteco malsupreniĝis dum la hispana invado al la hodiaŭa profundeco, tiel ke ni hodiaŭ nomas la indianojn simple kaj nepripense „sovaĝuloj“, ni ne nepre miru, ke ankaŭ iliaj medicinistoj kune aĉiĝis. Ili estis devigitaj, kune malsupreniĝi.

Sed ili ankaŭ delonge ne estas tio, kion ni supozas ilin esti. Mi ne jam estis ekkoninta blankulon, kiu iam estis iniciita de medicinisto pri liaj sekretoj kaj konceptoj, aŭ kiu almenaŭ komprenis la simbolecon de la rilataj agoj, kiel ĝi estu komprenata pro povi aserti, ke oni povas paroli, aŭ eĉ skribi pri tio. Vera medicinisto, kiu seriozas pri sia metio kaj digno, neniam sin fordonaĉas pro spektuloj. La tiel nomataj medicinistoj, la de tempo al tempo ĉe ni ĉirkaŭmigrantaj indianoj estas ĉio alia, sed ne veraj medicinistoj; en tiuj korptordiĝoj, saltadoj kaj aliaj bubaĉoj certe same malpli vera medicinisto partoprenus, kiel ekzemple ĉe ni seriozaj teologie aŭ science instruita dignulo ekhavas la ideon danci ŝuklakade aŭ transkapiĝe je kermeso aŭ *schützenfest* pro mono kaj enpublike.

Mi petas miajn legantojn tute ne supozu tiujn pripensojn esti enuigaj aŭ eĉ nenecesaj. Mi devis diri tion, ĉar gravas ekde nun esti juste kaj finfine ĉesi la ĝisnunajn erarojn, kiujn ni faris pri la psikologio de la ruĝa raso. Kiam ni konatiĝas al Tatela-sata, estante unu el tiuj malnovaj, alte elstarantaj medicinistoj de la estinteco, kiuj staras kiel kolonoj de antikva templo, mi estis devigita kiel priskribanto pretigi la ekzamenan rigardon de tiu templo.

La sekretoplena viro, pri kiu mi parolas per tia ega atestimo, ja ne estis estinta mia amiko, ho ne! Sed ja same ne mia malamiko! Li tute ne estis malamiko de iu homo. Lia pensado kaj sentado estis absolute juste kaj absolute humane, lia agado same. Sed kiel li rilatis al mi, tio estis eĉ pli malbone kaj pli malgajige, ol kiel li estus estinta mia malamiko. Fakte mi por li tute ne estis ekzistanta. Li tute ne atentigis pri mi. Kial? Ĉar li supozis min, ekde la tago, je kiu la patro kaj la fratino de mia Winnetou estis murditaj, esti ilia fakta murdinto. Per ŝia propra deziro kaj la deziro de ŝia tuta tribo, ŝi estis difinita esti mia edzino, sed mi estis rifuzinta ŝin. Ŝia nomo estis Nŝo-tŝi, kaj ŝi havis tiun nomon plenrajte. Nŝo-tŝi estas esperante „Bela Tago“, kaj kiam ŝi ekmortis, helkrepuskanta, bela espero de la apaĉoj eksenviviĝis kune kun ŝi, speciale kara, granda espero de la maljuna medicinisto Tatela-sata. Al li ŝi estis la plej bela kaj plej bona filino de ĉiuj apaĉaj triboj, kaj li asertis, ke ŝi tiutempe ne estus mortpafita, se mi ne estus

aginta rifuzante, sed akceptante. Mi ja konfesis tion malkaŝe, sed mi sentis min esti libere de ĉiu memriproĉo tiel tute, kvazaŭ la kara, sindonemega amikino vivus ankoraŭ hodiaŭ. Ŝi estis volinta iri en la orienton pro haviĝi pli altan edukadon, kaj survoje estis mortpafita kune kun Intŝu-tŝuna, sia patro, pro esti elrabata. Neniam Winnetou, ŝia frato, estus iam ekhavinta la ideon riproĉi al mi, eĉ ne nuance tial, ĉar ŝi komencis tiun vojaĝon pro mi; sed Tatela-sata pro tio estis neigita min plene el sia vivo kaj ĉiuj siaj pripensadoj, fakte por ĉiam kaj eterne, laŭŝajne. Ekde memorebla tempo li loĝis tute solece alte supre en la montaro. Nur ĉefoj rajtis proksimiĝi al li, kaj ankaŭ tiuj nur laŭeble malofte. Devis esti aferoj de plej ega graveco, antaŭ iu ricevis la permeson grimpi supren al li. Nur Winnetou, lia tute aparta karulo, rajtis veni ajn kiam plaĉis al si. Ajn ĉiu deziro, kies plenumigo estis iel eble, estis plenumigata, nur tiu unu ne, kiun li ofte vane eldiris, tiu, ke li estus permesata unu fojon kunalvenigi min.

Kaj nun, post tiel longa tempo, subite tiu urĝa invito! Tio povis havi nur tre seriozajn kaj tre gravajn kaŭzojn. Kaŭzojn, kiuj ne priis kutimajn kaj ĉiutagajn aferojn, sed rilatis al pli bonaj kaj pli valoraj aĵoj, kiujn mi nun, ĵus ricevinte lian leteron, ne povis eksciĝi. Sed nun certis, ke mi transiris, kaj ke mi atingu la Nugget-tsil:on je la ĝusta tempo, pro lasi la menciitan pinceon paroli al mi. Kaj same certis, ke la Koretinjo akompanu min.

Kiam ŝi aŭdis tion, ŝi ja ne ekĝojkriis, sed male faris sian plej seriozegan mienon. Ŝi pensis pri la penoj de tia vojaĝo kaj pri la danĝeroj de tia rajdado tra la okcidento. Ĉar certe la de proksime kaj malproksime alhastantaj multaj ĉefoj ne uzis la fervojon, tute memkompreneblis; entute tio jam estis ekskludita per la kaŝeco, per kiu ĉio devis okazi. Sed ŝi pensis, kiam ŝi parolis pri tiuj penoj kaj danĝeroj ne pri si mem, sed nur pri mi. Sed mi sukcesis tre facile konvinki ŝin, ke oni ja povis paroli pri la ,okcidento', sed jam delonge ne plu pri ,sovaĝa okcidento', kaj ke tia rajdado estos refreŝiĝo, sed ne peno al mi. Kio rilatis al ŝi mem, ŝi estis sufiĉe sane, kuraĝe, lerte, elteniĝeme nebezondere pro akompani min. Ŝi kapablis la anglan lingvon, kaj estis akirinta, per la lerta kunstudado kaj kunlaborado kun mi, parenteze ankaŭ la konon de kvanto da indianaj vortoj kaj proverboj, kiuj certe estis taŭgiĝontaj al ŝi. Ankaŭ rilate al la rajdado, nia lasta pli longa restado en la Mezoriento estis estinta bona lerntempo al ŝi. Ŝi estis konduktinta tie tute lerte, kaj lerninta bone trakti ne nur ĉevalojn, sed ankaŭ kamelojn.

Kaj kiel ĉiam kaj ĉie, ŝi ankaŭ nun prezentiĝis esti ruze kalkulanta, ekonomie antaŭvidanta mastrumino. Mi estis ricevintaj demandojn de kelkaj amerikaj eldonaj libristoj, kiuj rilatis al la eldono de miaj verkoj en la angla lingvo por tie transe. Laŭ la opinio de la Koretinjo mi persone vizitu tiujn sinjorojn je tiu ŝanco, pro, se ili akceptus miajn kondiĉojn, povi finkontrakti pli komforte kun ili, ol estis eble letere trans la distanco. Pro povi prezenti ekzemplojn por la kovraĵaj bildoj, ŝi faris fotajn kopiojn de la originalaĵoj, kion ŝi sukcesis tre bone, ĉar la Koretinjo kapablas la fotadon tre, tre pli bone ol mi. Plej bone ŝi sukcesis pri la al la ĉielo transiĝanta Winnetou de Sascha Schneider. De la sama artisto mi posedas ankaŭ du belegajn, kortuŝajn portretojn de Abu Kital, la perfortulo, kaj Mara Durimê, la homara animo. Ankaŭ tiuj, kiuj estas difinitaj por la nekstaj volumoj, estis fotataj, ja ne sur kartonon, sed nefortifikite, do tiel maldike, ke

ili bezonis preskaŭ neniun spacon en la kofro, kaj povis kunvolvite aŭ kunfaldite esti metataj en la vestopoŝon.

Mi petas, ankaŭ tie ĉi ne supozu tiujn ŝajne pure negocajn menciojn esti enuigaj aŭ eĉ nenecesaj. Oni vidus dum la daŭrigo de la rakontado, ke tiuj bildoj ricevis ne kutiman gravecon en la vico de la okazaĵoj. Kiu konas min, tiu scias, ke por mi ne ekzistas ‚hazardo‘. Mi atribuas ĉion, kio okazas, al pli alta volo, oni nomu tiun volon Dio, sorto, fato aŭ ajn iel alie. Tio sorto ankaŭ efikiĝis tie ĉi, pri tio mi estas konvinkita. La libristaj ofertoj pasis kaj malgraviĝis al nenio; mi tute ne havis la tempon viziti tiujn sinjorojn. La celo nur estis, krei la ideon kopii la librokovrilojn kaj kunpreni tiujn fotografiaĵojn.

Pli klare kaj pli videble tiu sorta celo evidentiĝis je alia oferto de editejo, kiu sed ne estis farata skribe, sed parole, fakte okulfrape je ekzakte la sama tempo, kaj ankaŭ de amerikano. Speciale atentindaj dum tio estas la flankaj cirkonstancoj, per kiuj la penso, ke ĉi ĉio estis nur hazardo, estis entute ekskludataj.

Tie ĉi en Dresden estas amiko de mi, kiu estas bone okupata kuracisto kaj psikiatro. Aparte en la lasta fako li havas eminentajn sukcesojn. En tiu fako li estas nomata aŭtoritatulo, kaj vizitata pro konsilo ne malpli de eksterlandanoj ol de proksimloĝantoj. Dresden konate estas multvizita turisturbo.

Dum vizito, kiun tiu amiko faris al ni, ne dimanĉe, kiam li havis liberan tempon, sed meze en la semajno, fakte malfrue je la vespero, do tempo, je kiu ni neniam antaŭe estis vizititaj de li, la temo de nia interparolo iam iĝis pri nia decido vojaĝi per la *Norddeutsche Lloyd* al New York.

„Do pro haviĝi *nugget*-ojn?“ li demandis tiel rapide, kvazaŭ li estis nur atendinta nian sciigon.

„Kial Vi pensas ĵus pri *nugget*-oj?“ mi respondis.

„Ĉar mi hodiaŭ vidis unu. Ĝi estis grande kiel kolomba ovo, kaj estis portata kiel *berloques* en horloĝa ĉeno“, li respondis.

„De kiu?“

„De amerikano, kiu cetere estis al mi multe pli interese ol tiu buleto da oro. Li diris al mi, ke li estas tie ĉi nur malmultajn tagojn, kaj li petis pri juĝo en kazo, kiu estas unuaranga ‚kazo‘ al ĉiu psikologo, do ankaŭ al Vi, mia kara amiko.“

„Kial?“

„Estis kazo de en familio herediĝanta deviĝo al sinmortigo, deviĝo, kiu nepre efikiĝas en ĉiuj branĉoj de la familio, sen indulgi pri nur unu, kaj je ĉiu unuopulo komencas tute, tute ete, pro kreskiĝi ĉiam kaj ĉiam pli forte, ĝis ĝi estas nerezistebla.“

„Mi jam aŭdis pri tiaj kazoj, kaj eĉ konatiĝis al unu tiel ŝarĝituloj persone. Krome li eĉ estis ŝipkuracisto, kun kiu mi veturis de Suez al Sri-Lanko. Ni pasigis plenan, stelhelan nokton sur la supra ferdeko per psikologiaj temoj. Li ekhavis fidon pri mi kaj diris al mi, kion li ĝenerale diras al neniuj aliaj. Unu frato kaj unu fratino jam mem finigis la propran vivon; la patro same. La patrino estis ekomortinta per aflikto kaj timo. Dua fratino postsendis nun al li dum tiu eksterlanda vojaĝo leterojn, ke ŝi neeble pluvus rezisti al la malfeliĉeca premo longe plu, kaj li mem estiĝis kuracisto nur, pro, se neniuj aliaj povus helpi, eble mem trovi la solvigmanieron.“

„Kio okazigis poste al li kaj lia fratino?“

„Tion mi ne scias. Li promesis al mi skribi, kaj doni al mi sian hejman adreson, sed neniam faris tion. Ĉu la afero estis simile malgajige pri Via amerikano?“

„Ĉu pri li mem, tion mi ne povas diri. Li ne eldiris nomojn, ankaŭ ne sian propran, kaj kondukis kvazaŭ li nur rakontis pri konatuloj, sed ne pri sia propra familio. Sed la impresoj, kiun li faris al mi, estis tia, ke mi pensas lin esti persone rilatata. Li havas tiel senlime malgajajn okulojn. Li ŝajnis esti bona homo, ke mi vere kortuŝite bedaŭris, ke mi ne povis doni esperon pri certa helpo al li.“

„Sed almenaŭ konsolon, ĉu?“

„Jes, konsolon kaj konsilon. Sed pripensu tian abundecon da malfeliĉo: La patrino estis enpreninta venenon. La patro estis senspure malaperinta. El kvin infanoj, kiuj ĉiuj estis filoj, vivas ankoraŭ nur du. Ili ĉiuj estis edziĝintaj, sed forlasintaj de iliaj edzinoj, ĉar la emo pri sinmortigo aperis je iliaj infanoj jam en la aĝo de naŭ aŭ dek jaroj, kaj evoluiĝis tiel rapide, ke nur unu el ili atingis la aĝon de sesdek jaroj.“

„Do ili ĉiuj mortas, ĉu?“

„Jes, ĉiuj. Nur la du menciitaj fratoj ankoraŭ vivas. Sed ili interbatalas kontraŭ la memmortiga premo tage kaj nokte, kaj mi ne kredas, ke unu el ili estos tiel forte venki tiun demonon en si.“

„Terure!“

„Jes, terure. Sed same enigmoplene kiel terure! Tiu malfeliĉa premo ja ekzistas nur maljam en la dua generacio; antaŭe ĝi ne estis ekzistinta. Bedaŭrinde ne povis esti dirata al mi, je kiu ĝi aperis unue, ĉu je la per veneno ekmortinta patrino aŭ ĉu je la malaperinta patro. Ankaŭ mi ne eksciis, ĉu tiu malsaneco eble komencis je ia okazaĵo, kiu estis ligata al granda aŭ malfeliĉaj psikaj ekskuoj. Tio ja almenaŭ ebligis startopunkton. Sed tiel mi devis enlimiĝi konsoli klopodigan laboron por korpo kaj menso, lojalan devoplumigon, kiu interesanĝu kun gaja, sed ja tute ne vulgara distro, kaj antaŭ ĉio pludaŭran provadon kaj pluhardigon de la karakteraj kaj volaj fortoj, kiuj estas la plej gravaj aĵoj en tiu afero.“

„Ĉu Vi eksciis la staton de tiu malfeliĉa familio?“

„Jes. Tiu ja estis unu el la plej gravaj demandoj, kiujn mi devis fari. La malaperinta patro estis okcidentulo, *squatter*, *trapper*, orŝercisto kaj ĉio alie tiaspeca, kaj de tempo al tempo alportis hejmen, kion li trohavis. Ofte tio estis vere atentindaj sumoj. Li havis la manion voli esti milionulo. Tio ja ne estis atinginta, sed riĉe, almenaŭ sufiĉe riĉe la familio ja estiĝis. La kvin fratoj unuiĝis al granda entrepreno pri ĉevaloj, bovoj, ŝafoj kaj porkoj —“

„Ili do multe negocis kun la grandaj buĉejoj, ĉu?“ mi interrompis lin.

„Ho jes.“

„Kun tia inklino tio ja povis esti nur danĝere, tre danĝere!“

„Nepre! Amasa buĉado de bestoj! Varma sangovaporo! Ĉiama vianda aŭ eĉ kadavra odorolo! Sekve hardigo de la kunsentemo! Vera nutro kaj grasigo de tiu interna demono! Mi diris tion tute malkaŝe al la amerikano, kaj avertis lin. Li sciigis min, ke li certe ankaŭ estis sentinta tion, kaj tial estis la konsilanto kaj helpanto al la fratoj vendi la entre-

prenon. Tio estis okazinta en la antaŭa jaro, sed sen ke poste ia pliboniĝo aŭ eĉ malpli-
iĝo de la sufero estis okaziĝinta. — Sed, jen mi ja parolas al Vi ankoraŭ je la malfrua
vespero pri aĵoj, kiuj povas detrui mian kaj Vian noktan ripozon. Mi petas Vian pardon-
on kaj estas sufiĉe ruze, pro ne esti forpeletate de Vi, nun elĵeti min mem. Dormu bone!“

Li interrompiĝis tiel eke kaj foriĝis tiel rapide, kiel ĝi alikaze tute ne estis lia maniero.
Ĵus ekzakte same li kondukis ĝenerale per sia hodiaŭa vizito. Estis, kvazaŭ li estis ven-
inta al ni ekster la kutima tempo nur tial, pro atentigi nin pri tiu amerikano. La Koret-
injo havis la saman senton kiel mi.

„Hodiaŭ li ŝajnis al mi tute ne kiel vizitanta amiko, sed kiel mesaĝisto“, ŝi diris. „Ĉu
io en la afero de tiu *yankee* estu ero, kiu ankaŭ rilatas al ni? Tiukaze mi certe povas
dandi nur vin, sed ne aliajn, kiuj supozus ke estus eble mokridi pri mi!“

Kaj mi pensis, ke ŝi pravis. Kaj vidu jen: Je la sekvinta antaŭtagmezo, je la vizito-
tempo, ĉirkaŭ la dek unua horo, mi sidis laborante. Mi aŭdis la domsonorilon. Iu estis
enlasata. Mi estis dirinta, ke mi hodiaŭ ne estis alparoleble de absolute neniu. Tamen
la Koretinjo venis supren al mi post kelka tempo, metis nomkarton antaŭ min kaj diris:

„Pardonu! Mi ne povas agi alie; mi devas interrompi vin! Estas tro strange — vi
miros.“

Mi faris vidon al la karto. „Harimen F. Enters“ estis printita sur ĝin, nur tiu nomo,
nenio plu. Mi ekspektoplene vidis al la Koretinjo.

„Jes, estas vere mirige“, ŝi kapskuis. „Li havas la kolombove grandan *mugget*:on je la
horoloĝoĉeno.“

„Ĉu vere — vere?“

„Jes! Kaj la evidente malgajaj okuloj ankaŭ tieas!“

„Kaj kion li volas?“

„Interparoli kun vi.“

„Mi ne havas tempon. Ĉu vi diris tion al li? Li revenu!“

„Li devas foriri jam hodiaŭ, alikaze li ne atingos la ŝipon ĝustatempe. Li diras, ke li
ne foriros sen esti interparolinta kun vi. Li restos sidante, ĝis vi venos. Vi diru al li,
kiom kostas la tempo, kiun vi perdos per tio; li tuj pagos.“

„Tio estas amerika sensencaĵo! Ĉu li diris al vi, kio li estas?“

„Editeja librokomercisto. Ŝajne li ne povas paroli unu germanan vorton. Li volas
aĉeti Vian ‚Winnetou:n‘.“

„Ĉu vi jam diris ion al li pri tio?“

„Mi sciigis lin, ke ni jam ricevis similajn ofertojn de tie transe, kaj baldaŭtempe
transveturos per *Lloyd* pro negoci pri tio.“

„Aŭskultu, Koretinjo, tio estis ne tre saĝe de vi!“

„Kial ne?“

„Ajn kiu volas iri al la ‚okzidento‘, tiu antaŭ ĉio kutimiĝu al prisilentado, tute egale,
ĉu ĝi ankoraŭ estas sovaĝe aŭ ne.“

„Sed ni ja ankoraŭ ne estas tie transe!“

„Mi diris: jam kiam oni volas transiri; komprenu: volas! Cetere, pro devi esti silent-
ema, ni ne plu devos transiri, ĉar la okzidento jam estas tie ĉi ĉe ni.“

„Kie?“

„Malsupre ĉe tiu amerikano. Tiu *Mr.* Hariman F. Enters estas la amerika okzidento.“

„Ĉu vi pensas tion?“

„Certe! Vi baldaŭ vidos, ke tio ĝustas. Li estu, ajn kio li volas esti, ni nun ludas Amerikon. Li venis pro kaŝiri al ni. Ni nun turnigu la aferon! Nun iru malsupren kaj diru, ke mi venos; sed ne sciigu lin pli. Parolu kun li entute ne pli ol neces!“

Ŝi iris, kaj mi sekvis ŝin post kelka tempo. *Mr.* Enters estis bonfigura, glatrizita homo en la aĝo de ĉirkaŭ kvardek jaroj. Li faris bonvolon vekantan impreson, sed sen prezenti la konduton de alte edukita viro. Li prezentiĝis modeste, sed tamen ankaŭ estis iomete fanfaronulo dum tio. Tio pri la malgajaj okuloj ĝustis. Ridi li ŝajne tute ne kapablis, kaj kiam li foje ridetis, tio plie faris la impreson de turmento ol tiu de gajeco. Mia edzino prezentis nin unu al la alia. Ni kliniĝis unu antaŭ la alia, kaj tiam sidiĝis vid-alvide. Mi petis lin diri al mi, per kio mi povis servi al li. Li respondis, demandante:

„Ĉu Vi estas Old Shatterhand?“

„Oni nomis min tiel“, mi respondis.

„Ĉu ankoraŭ nun?“

„Tre verŝajne.“

„Vi baldaŭtempe retransiros, ĉu?“

„Jes.“

„Kie? Ĝis kien?“

„Mi ne jam scias.“

„Per kiu ŝipo?“

„Ankoraŭ necertas.“

„Kiel longan tempon?“

„Tio decidiĝos nur transe.“

„Ĉu Vi vizitos delongan konatulojn?“

„Eble.“

„Ĉu Vi iros plie al la nordo aŭ al la sudo de la ŝtatoj?“

Mi stariĝis de mia seĝo, kliniĝis, turniĝis kaj iris al la pordo.

„Kien Vi volas iri, *Mr.* May?“

Mi ĉesiris kaj respondis:

„Reen al mia laboro. Mi postulis de Vi sciigi min, kion Vi deziras de mi. Anstataŭ fari tion, Vi faradas tutan aron da demandoj al mi, pri kiuj Vi posedas eĉ ne la plej etan rajton. Pro respondi al tio, mankas al mi la tempo.“

„Mi diris al *Mr.* May, ke mi tuj pagos, kion tio kostas“, li enŝovis.

„Tion Vi ne povas. Pro tio Vi estas multe tro malriĉe, multe tro malriĉe!“

„Ĉu Vi kredas tion? Ĉu mi vere faras tian malriĉecan impreson? Vi eraras, *Sir!*“

„Certe ne. Ĉar eĉ se Vi estus posedanta mil miliardojn, Vi tamen ne kapablus eĉ ne pagi de la plej malriĉa bedaŭrindulo nur kvaronan horon da la al li de Dio doninta, ne-anstataŭigebla vivotempo!“

„Se Vi kredas tion, ĝi estu tiel. Bonvolu rezidiĝi! Mi parolos laŭeble koncize.“

Li atendis, ĝis mi estis plenuminta tiun deziron ŝajne hezitinte, tiam li kontinuus:

„Mi estas editeja librovendisto. Mi konas Vian ‚Winnetou:n‘ —“

„Ĉu Vi parolas kaj povas legi la germanan?“ mi interrompis lin.

„Ne“, li respondis.

„Kiel Vi do povas koni tiun rakontaĵon? Laŭ mia scio ĝi ankoraŭ ne estas tradukita en la anglan.“

„Ĝi estis laŭtlejgita de amika familio, en kiu oni ankaŭ parolas la germanan, kaj pro mi samtempe tradukata ĵus dum la legado. Kion mi aŭdis tie, fascinis min tiel, ke mi dungis junan, senlaboran germanamerikanon, pro lasi ĝin laŭtlegi al mi per ĉia trankvileco iom post iom, tiel ke mi komprenis ĉion kaj ke mi povis fari la al mi ŝajne necesajn notojn.“

„Ha, notojn! Kial notojn?“

Mi rimarkis, ke tiu demando embarasis lin. Li provis kaŝi tion, kaj respondis:

„Memkompreneble nur pure literaturajn, kiel librovendisto, nature! Mi tiam dum miaj longaj rajdadoj en la okcidento kunhavis tiujn notojn ĉe mi, kaj kontrolis ĉion, kio estas en Viaj tri volumoj. Tial mi estas en la stato, ke mi povas diri al Vi, ke ĉio ĝustas, ofte eĉ la plej eta detalo.“

„Dankon!“ mi diris krude, kiam li vidis al mi dum tio pro ekscii, ĉu tiu laŭdo faris impreson al mi.

„Nur du lokojn“, li pluis, „mi ne jam povis kontroli, ĉar mi ne povis trovi ilin.“

„Kiujn, *Sir*?“

„La Nugget-tsil:on kaj la ‚Malhelan Akvon‘, en kiu Santer trovis sian plenmeritan finon. Ĉu Vi eble je Via nuna vojaĝo iros al tiuj lokoj?“

„Eble, sed sameble ne. Sed mi aŭdas, ke Vi denove faras nenecesajn demandojn, anstataŭ diri al mi, kion Vi volas —!“

Mi ekmoviĝis pro restariĝi.

„Restu sidante, restu sidante!“ li rapide vokis. „Mi ja tuj estos je la temo, aŭ plie, mi ja ne jam deflankiĝis de ĝi. Mi nur volis montri al Vi, ke mi kontrolis Viajn librojn, kaj pensas, ke ili estas inde esti tradukataj en la anglan lingvon.“

„Ĉu kontrolis? Sed pro tio necesas longaj jaroj!“

„Ankaŭ necesis, ankaŭ necesis!“ li haste kapjesis, sen rimarki, ke nun mi estis la kaŝaliranto. „Daŭris tre longan tempon, ĝis mi estis vizitintaj ĉiujn tiujn lokojn, kiuj estis menciitaj.“

„Ĉu tio akordis kun Via komercado?“

„Certe, certe. Tiutempe ni havis grandan entreprenon pri ĉevaloj, bovoj, porkoj kaj ŝafoj, kaj ofte vojaĝis dum niaj aĉetadoj en la olda okcidento.“

„Vi diris ‚ni‘. Do kunsocietanoj, ĉu?“

„Jes, sed ne fremduloj, sed frata societo. Ni estis kvin fratoj, sed hodiaŭ ankoraŭ estas nur du plu. Ni ankoraŭ havas kunan entreprenon, sed ne pli pri ĉevaloj kaj bovoj, sed pri libroj. Ni volas aĉeti Vian ‚Winnetou:n‘ —“

„Ĉu nur tiun?“ mi interrompis lian parolon.

„Jes, nur tiun“, li respondis.

„Kial ne ankaŭ la aliajn librojn, kiuj same estas vojaĝaj rakontaĵoj?“

„Ĉar ili ne interesas nin.“

„Mi pensas, ke plie gravas, kio interesas la legantojn, ĉu ne?“

„Eble; sed pri ni estas alia afero. Ni nur volas la ‚Winnetou:n‘, nenion pli.“

„Hm! Kiel Vi imagas tiun negocon?“

„Tute simple: Vi vendas ĝin al ni kune kun ĉiuj rajtoj, unu fojon por ĉiam, kaj ni pagos ĝin al Vi unu fojon por ĉiam.“

„Kiam okazos tiu pago?“

„Tuj. Mi kapablas fari ordonon pro tiu al ajn ĉiu banko. Kiom Vi postulas?“

„Kiom Vi ofertas?“

„Tio dependas! Ĉu ni rajtas printi ajn kiom multajn ekzemplerojn, kiel ni volas?“

„Se ni interkonsentos, jes.“

„Aŭ ĉu ankaŭ tiel malmultajn?“

„Ne.“

„Ĉu? Kio? Ĉu ne?“

„Memkopreneble ne! Mi skribas miajn librojn, pro ke ili estas legataj, sed ne, ke ili malaperas.“

„Ĉu malaperas?“ li demandis kun moviĝo de surpriziĝo. „Kiu diris al Vi, ke ili malaperu?“

„Tio fakte ne estis dirita tiel; sed Vi ja menciis, ke ankaŭ estu printotaj tiel malmultajn ekzemplerojn, kiel plaĉos al Vi.“

„Memkompreneble. Se ni vidos, ke la libroj en la angla ne vendeblos, ni do rezignus printi ilin. Tio ja kompreneblas per si mem!“

„Ĉu Vi seriozas?“

„Jes. Diru, ĉu Via vojaĝo al Germanujo kaj Dresden celas ankaŭ al io alia?“

„Ne. Mi ne havas kaŭzon forsilenti de Vi, ke mi transvenis tien ĉi nur pro Viaj tri libroj.“

„Do mi bedaŭras, ke Vi faris tiun vojaĝon vane. Vi ne ricevos la librojn.“

Dum tiuj vortoj mi estis stariĝinta. Ankaŭ li stariĝis de sia seĝo. Li ne kapablis kaŝi la tute neekspektitan, grandan elreviĝon, kiu regis lin. Lia vido estiĝis time, kaj lia voĉo tremis, kiam li demandis:

„Ĉu mi komprenas Vin ĝuste, *Sir*? Vi ne volas vendi la ‚Winnetou:n‘, ĉu?“

„Almenaŭ ne al Vi. Mi ne fordonas miajn librojn al tradukado unuope. Ajn kiu deziras nur unu aŭ kelkajn, tiu ankaŭ estas devigata preni ilin ĉiujn.“

„Sed kio, se mi pagos al Vi tiom pro tiuj tri volumoj, kiom Vi postulas pro ĉiuj?!“

„Eĉ tiukaze ne.“

„Do Vi vere estas tiel riĉe, *Mr. May*?“

„Ne, tute ne. Oni ne povas paroli pri riĉeco je mi. Mi havas nenion, krom mia bona, al mi kaj miaj celoj ĵus sufiĉanta porvivaĵon, ne pli. Sed tio plene sufiĉas al mi. Kaj se Vi vere konas mian rakontaĵon ‚Winnetou‘, Vi scias, ke mi strebas al mono tute ne, sed al plej altaj, pli valoraj aĵoj, per kiuj mi volas ĝojigi kaj beni miajn legantojn. Pro tio necesas, ke miaj libroj havas la ĝustan eldonanton, kaj ke Vi ne estas tiu, pri tio Vi ĵus konvinkis min.“

Mia edzino vidis kaj aŭdis de mi, ke neniŭ ŝanĝeblis je mia decido. Ŝi bedaŭris la *yankee*-n. Li jen staris kun mieno kaj en teniĝo, kvazaŭ nereboniga malfeliĉo ekokazis al li. Li hezitis kompreni, ke mia eldiro estis mia lasta vorto. Li eldiris kontraŭojn. Li temis kaŭzojn. Li promesadis, sed vane. Fine, kiam nenio plu volis efikiĝi, li diris:

„Malgraŭ ĉio mi ne rezignas pri la espero, ke mi tamen ricevos la ‚Winnetou:n‘ de Vi. Mi vidas, ke *Mrs.* May estas multe pli neobstinema ol Vi. Interkonsiladu kun ŝi, kaj donu tempon al mi intertempe interparoli kun mia frato, kiu ja estas mia kunsocietano.“

„Ĉu Vi tiam do volas retransveni? Tio estos same vane kiel Via nuna vojaĝo“, mi asertis.

„Ne necesas al mi transveni, ĉar Vi ja, kiel mi aŭdis, baldaŭ transiros. Donu al mi ajn iun adreson tie transe, kaj difinu tagon al mi, kiam Vi estos viziteble tie, kaj mi aperos.“

„Ankaŭ tio ne havos sukceson!“ mi konstatis.

„Ĉu Vi povas scii tion jam nun? Ĉu ne eblas, ke mi povos, post la interparolado kun mia frato, doni ofertan al Vi, kiu taŭgas pli bone al Viaj celoj kaj deziroj ol la hodiaŭa?“

Mi sentis, ke li interne tremis per timo esti rifuzata ankaŭ per tio. Ankaŭ mi kompatis pri li, sed mi ne devis permesi al tiu sento havi influon al la rego pri miaj decidoj. La Koretinjo faradis petantajn vidojn al mi, kaj kiam tio ne volis efikiĝi sufiĉe rapide, ŝi ekprenis mian manon. Jen mi diris:

„Bone, tiel ĝi estu. Ni donu iom da tempo al ni pro pripensado! Mia edzino neniam antaŭe estis transe kun mi. Ŝi speciale antaŭĝojas vidi la Akvofalojn de Niagaro. Do de New York ni unue veturos per la Hudson-vaporŝipo al Albany, kaj de tie per la trajno al Buffalo, de kie estas ankoraŭ nur unu horo da vojo plu al la akvofaloj. En Niagara-Falls ni loĝos sur la kanada flanko, fakte en la hotelo Clifton, kie mi —“

„Tiun mi konas; tiun mi konas tre bone!“ li interrompis min. „Oni loĝas tie tre bone. Estas hotelo de la plej unua rango, trankvile, elegante, provizite per ĉiuj bonaĵoj de la moderna tempo, kaj —“

„*Well!*“ nun mi interrompis lian parolon, pro finiĝi tiun laŭdadon, per kiu li nur volis prezenti sin mem en pli bona lumo. „Se Vi konas ĝin, ja bonas. Do tie ni estos trov-eblaj.“

„Kiam?“

„Tion mi ne jam scias. Estas plej bone, se Vi kontaktiĝos al la administracio de la domo, ke ili sciigos Vin tuj post nia alveno.“

„Ĝuste! Tio estas la plej bono aĵo, kaj tion mi faros!“

Estis decidita. Plu sekvis kelkaj ĝentilaj adiaŭaj vortoj, tiam la vizito estis finiĝinta, kiu estis multe pli grave, ol mi nun pensis.

La Koretinjo povis esti ne tute kontente pri mi. Ŝi inklinas tree al komparto kaj komprenvolo, kaj la tima, torturiteca vido de tiu viro okupis ŝin ankoraŭ plu dum la nekstaj tagoj. Ŝi opiniis, ke mi ne estis sufiĉe ĝentile al li, kaj traktis lin tro rifuzeme.

„Kial vi agis tiel?“ ŝi demandis.

„Ĉar li mensogis al mi“, mi respondis. „Ĉar li ne agis malkaŝe kaj honeste. Ĉu vi scias, kiu li estas?“

„Jes.“

„Nu, kiu?“

„Unu el la plurestantaj filoj de tiu malfeliĉa familio, kies membroj ĉiuj ekmortis per memmurdo.“

„Jes, tiu li fakte estas, sed samtempe ankaŭ iu alia. Lia nomo ne estas Enters.“

„Vi pensas, ke li uzas malĝustan nomon, ĉu? Ĉu vi pensas, ke li estas trompulo, fripono?“

„Ne. Ĝus ĉar li estas honesta viro, li ne uzas sian veran, ĝustan nomon. Li hontas pri ĝi. Mi eĉ supozas, ke li nur rezignis pri sia nomo pro miaj tri volumoj de ‚Winnetou‘.“

Ŝi estis tiel mirigite pri tio, ke ŝi forgesis pludemandi. Tial mi pluis nedemandite:

„Ĉu vi pensas, ke eblas, ke mi estas konvinkita, ke mi konas lian veran nomon?“

„Diru ĝin!“ ŝi postulis al mi.

„La nomo de tiu viro estas neniu alia, sed Santer.“

Ŝi faris la per mirego senspiran demandon:

„Pri kiu Santer vi parolas? Ĉu la murdinto de la patro kaj la fratino de Winnetou?“

„Jes. La viro, kiu estis ĉe ni, estas lia filo.“

„Neeble, neeble!“

„Certe, certe!“

„Pravu tion!“

„Fakte tio nenecesas. Vi certe povis diveni tion same rapide kaj facile kiel mi.“

„Ĉu vere? Ĝis nun mi komprenas nur tiun unu aĵon, ke vi pensas, ke li estas mensoganto, ĉar li nomiĝas Enters anstataŭ Santer.“

„Kiel malĝuste de vi, kiel malĝuste! Se miaj konkludoj bazu nur sur tiu unu punkto, mi estus elstarante malbona spurolegisto, *greenhorn*, nepripensulo, kaj mi devus honti ruĝiĝe kaj bluiĝe pri mia logiko. Sed mi petas vin ekzemple pripensi, ke li speciale dungis laŭtleĝanton, pro povi fari notojn. Kiel longa tempo boneble pasis, dum li faris tion?“

„Sufiĉe longa jararo. Tion li ja diris mem.“

„Bone! Kaj pro kio li faris tiujn notojn?“

„Per pure literaturecaj kaŭzoj, pro librovendistaj celoj. Ankaŭ tion li diris mem.“

„Tute ĝuste! Kaj jen la mensogo, je kiu komencas la spuro, kiu kondukas al lia vera, ĝusta nomo. Li mem konfesis, ke li tiutempe estis komercisto pri ĉiaj buĉobestoj, kaj vi scias tre ekzakte, kiam li ĉesis fari tion. Aŭ ĉu ne?“

„Sed jes! Tiu entrepreno estis vendata nur lastan jaron. Tion li diris hieraŭ ĉe la kuracisto.“

„Kaj tamen jam antaŭ jarojn pure ‚librovendistecaj‘ notoj, ĉu? Ĉu vi kredas tion?“

„Ne! Nun ne plu! Aŭskultu, nun mi ankaŭ komencas kompreni vdi klare. Eble eĉ ne veras, ke li nun estas librovendisto!“

„Ne ekideus al li! Sed per tiu pensu vi stariĝis flanke de mi sur la ĝustan spuron! Pri-pensu tion: Apenaŭ, ke li aŭdis de konatulo pri mia ‚Winnetou‘, li dungis specialan viron pro tradukado kaj laŭtleĝado de tiu rakontaĵo. Nu estas supozinde, ke li estis ĉe la konatulo dum la tuta laŭtleĝado de ĉiuj tri volumoj?“

„Certe ne.“

„Tio ankaŭ estas mia opinio. Li aŭskultis nur kelkajn mallongaĵojn. Se li tuj post tio dungis specialan privatan tradukiston pro konatiĝi al la verko detale, tiuj kelkaj mallongaĵoj certe estis eminente gravaj al li, certe trafis kaj ekprenis ian punkton de lia pli interna menso. Aŭ ĉu vi kredas, ke tiu graveco eble ja vere nur estis ‚pure literatureca, librovendisteca?‘“

„Ne.“

„Aŭ komerca, ĉu?“

„Same ne. Ĝi estis, kiel vi supozas tute prave, psikologia, animeca.“

„Per aliaj vortoj tio signifas, ke ili rilatis al lia interneco, lia privata vivo, lia familia vivo, do ankaŭ al lia familiaj cirkonstancoj. Li faris notojn dum la laŭtlegado. Kial kaj pro kio? Certe ja ne nur pro ne forgesi ion! Ajn kio tuŝas iun tiel profunde en la animo, tion oni certe memortenas ankaŭ sen notoj. Li konfesis, ke tiuj notoj ŝajnis al li esti ‚necesaj‘, kaj ke ili utilis al li kiel gvidaĵoj dum liaj jarlongaj esploradoj en la okzidento —“

„Do pri la malaperinta patro, ĉu?“ la Koretinjo jen haste eldiris.

Mi kapjesis al ŝi kaj respondis:

„Aŭskultu, tio estis bone, tre bone de vi! Jes, fakte pri la malaperinta patro! Mi volis ankoraŭ fari kelkajn konkludojn kaj konkludigojn, pro ke vi povas kompreni min; sed nun, ke vi venas mem kun tiu ĉefa rezulto, tio ja, almenaŭ intertempe ne plu necesas. Mi ankoraŭ nur indiku al la urĝeco, per kiu li provis ekscii la situon de la du lokoj, kiujn kiel li diris, ‚ne jam povis trovi‘. Mi celas al la Nugget-tsil kaj la ‚Malhela Akvo‘.“

„Ĉu tiu urĝeco nur povas rilati al Santer?“

„Jes.“

„Ĉu ne al ajn alia persono? Kaj ĉu ankaŭ ne al la *nugget*:oj?“

„Ne. El la personoj eminentas nur mi, ĉar ĉiuj aliaj negravas, aŭ eĉ mortas, kaj supozis, ke li travojaĝis la okzidenton nur pro mi, estus ridinde. Li ja pruvis per sia hodiaŭa vizito, ke li jes certe scias, kiel rapide kaj facile mi estas troveble. Kaj kio rilatas al la *nugget*:oj, li ja legis, ke ili estas perditaj por ĉiam, kaj ke ili ne plu povas esti trovataj de neniu homo. Do: per la okazoj ĉe la Nugget-tsil kaj ĉe la ‚Malhela Akvo‘ eminentiĝas nur du personoj: tiuj estas Santer kaj mi; ĉiuj aliaj personoj estas senlime ekskludendaj, estas malaperintaj; sed mi ankaŭ ekskludigas, do ankoraŭ restas nur Santer. Kaj nun atentu, Koretinjo, jen venas plua ĉefkaŭzo, sur kiun mi apogiĝas! Tiu tiel nomita Enters volis aĉeti mian ‚Winnetou:n‘. Pro kio? Eble pro traduki, printi kaj disdoni ĝin, ĉu?“

„Ne, sed pro malebligi, ke la rakontaĵo publikiĝos tie transe en la angla lingvo. Pri tio vi pravis, Oni komprenis tion per la vortoj de tiu viro, speciale per la ektimo, kiun li ne povis kaŝi, kiam li eksciis kontraŭe al ĉiuj liaj ekspektoj, ke li ne ricevu tiujn librojn. Oni tie transe ne ekkonu la estinton kaj la agojn de lia patro.“

„Jes. Mi ja unue volis dedukadi tion, kaj nun vi venas kun la preta logika konkludo; sed estas fakto, pri kiu mi dubas eĉ ne ete. Li pensis, ke li povis trompi min per poŝo plena je dolaroj, kvankam li devis scii per la ‚Winnetou‘, ke mi ne estas kaptebla per tiuj logiloj. Tiu lia vizito ĉe mi kaj lia oferto fakte estis ofendo, al kiu mi estus devinta respondi alie, kiel mi respondis al ĝi.“

„Do vi nun eble koleras pri mi, ĉu?“

„Ĉu koleri? Pri kio?“

„Pri tio, ke mi igis vin ne finfine rifuzi lin, kaj permesi al li pluan kunvenon.“

„Ho ne! Mi ne lasas min igi, eĉ ne de vi, foraceti ajn iun pli altuman, eble eĉ etikan bonon pro vulgara mono, kaj vi, vi certe estus la plej lasta, kiu postulus tion de mi. Mi akceptis la revidon ĉe la Niagara, ĉar estas tre gravaj kaŭzoj ne lasi la du fratojn Enters aŭ Santer ekster atento ekde nun. Vi ja scias, ke estas kutimo de ĉiu sperta okcidentulo neniam ebligi, ke danĝeraj homoj venas malantaŭ la propran dorson.“

„Ĉu danĝeraj?“ ŝi demandis. „Mi pensas, ke tiu Enters, kvankam li ŝajnas esti unu Santer, tamen estas bona homo.“

„Mi ankaŭ. Sed ĉu eĉ la enpersonigita boneco ne foje povas estiĝi obstine? Ĉu ne en la afliktiteco kaj, mi preskaŭ volas diri, en la malsaneca melankolio de tiu viro estas io ekkrevemeca, antaŭ kiu oni gardiĝu? Kaj ĉu ni konas lian fraton? Vi scias, fratoj neniam necese havu la saman karakteron, kaj la saman temperamenton. Mi estas konvinkita, ke ni konatiĝis al li en Niagara-Falls, kaj tiam ja videblos, kiel ni konduku antaŭ ili, pro ne devigi ilin sekvi la karakterajn spurojn de ilia patro. La doktoro hieraŭ parolis pri demono en ili. Tiu demono nun trovis nin tie ĉi, malkaŝis nin. Estas la Santer:a deviĝo al murdo. Vi vidas, nia vojaĝo komencas estiĝi ege interesige, jam antaŭ ni faris la unuajn paŝojn.“

„Ĉu vi antaŭvidas danĝeron?“

„Ho ne, mi nur vidas, ke ni iru transen pro konatiĝi al la Mount Winnetou kaj al Tatela-sata, la ‚Tenanto de la Granda Medicino‘. Li skribis al mi, ke mi ‚savu‘ mian Winnetou:n. Se mi faru tion, ne estos danĝero al mi. Ĉu al vi?“

„Al mi same ne. Mi gaje kunvenos!“

„Do ek, al feliĉa veturo!“ —